


KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Adiaŭ, somero, adiaŭ...

Perevalov Juri], [Lesnoj, Rusio]

2002

Kiel David Wolff, Prezidanto de ELNA iĝis esperantisto
literatur-historiaj paĝoj — raportoj el Kosovo — por gajaj instruantoj kaj
scivolemaj lernantoj — neelpensitaj historioj — tempo kaj homoj —
aforismoj — anekdotoj — invitoj kaj informoj — korespondu!

4

Perantoj de KOMENCANTO

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorčka 1, CZ-696 62 Strážnice

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykøbing F.

Estonio Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio

Višnja Brankovič, Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugalio Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum pl 455, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

La 4-a numero de "K-2002" aperas tiam, kiam la someraj ripozoj jam finiĝis kaj tial kelkaj materialoj de ĉi-numero memorigas pri la pasinta ripozo kaj ferioj.

De la paĝo "Kiel tio komenciĝis" vin salutas eks-Prezidanto de ELNA (Usono) *David Wolff* kun rakonto pri sia esperantis-tiĝo.

Sur la sekvaj paĝoj ni prezentas al vi du latvajn poetojn, kiuj kreadis dum la dua literatur-historia periodo: *L. Jevsejeva kaj N. Kurzens*. Post ilia lirika poezio vi trovos raporton el kruda realeco. Ĝin sendis nia abonanto el Germanio *Jürgen Kloker*, kiu ekzakte nun servas kiel internacia policisto en Kosovo, Jugoslavio.

Daŭrigas prezenti E-gramatikon en ŝerca formo la paĝoj "Por scivolemaj lernantoj kaj gajaj instruantoj".

Ĉe la rubriko "Neelpensitaj historioj" vin denove atendas veraj amuzigaj okazintaĵoj. En la sekvaj rubriko "Tempo kaj homoj" vi povas legi interesan kaj filozofie manoveleton, senditan el Brazilo de *J.R. Tenorjo*.

Ni esperas, ke tradiciaj aforismoj kaj anekdotoj kreas ĉe vi bonan humoron.

Ĉe la 15-a paĝo ni petas vin atente legi alvokon de la Estraro de UEA "Al lingva demokratio!". Sampaĝe vi trovos impresojn de la partoprenintojn pri someraj E-aranĝoj en Rusio.

En la revuo, kiel ĉiam, estas multaj bildoj, inter kies aŭtoroj aperis kelkaj novaj nomoj.

Agrablan legadon!

Viaj donacoj por KOMENCANTO ĉiam bonvenas!

KOMENCANTO

2002 numero 4 // (36) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifa por 2002:

internacia tarifo: 15 eŭroj aŭ \$15;

orientalropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 120 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, а.б. я. 132

Oni rajtas uzi bildojn kaj vertojn el "K"


La sola kondiĉo - nepre menci KOMENCANTO n, la nomojn de la aŭtoroj kaj ties logojon.

Kiel tio komenciĝis

David Wolff

Eks-Prezidanto de ELNA — Esperanto Ligo por Norda Ameriko, Usono.

Esperanto, por mi, komenciĝis kiel hobbio, sed poste mi konsideris ĝin kiel ilo por plibonigi la mondon.



Mi unue eksciis pri Esperanto kiam mi havis dek kvin jarojn. Tiam mi legis romanon el la serio "La Viro de UNCLE" (bazita je televida spiona serio kun la sama nomo). Estis en la libro nur du paragrafoj kiuj menciis Esperanton. La malbonuloj provis kaŝi sian originon kiam ili komunikis siajn postulojn per la uzo de Esperanto. Mi aĉetis la libron "Teach Yourself Esperanto" (Instruu mem Esperanton) en librovendejo, sed trovis, ke studi la lingvon sole estas teda, kaj forlasis ĝin.

Mi studis la francan lingvon dum tri jaroj en la lernejo sed neniel mastris ĝin. En la mezlernejo mi studis la latinan lingvon dum kvar jaroj kaj povis legi ĝin, sed ne paroli ĝin. Plue, la latina ne helpis min komuniki kun iu ajn. Post kolegio mi volis lerni lingvon sufiĉe por fari ion utilan per ĝi, por vere povi komuniki per ĝi.

Mi pripensis provon vere mastri la francan, la hispanan. aŭ la germanan, sed ili ĉiuj estas tre

malfacilaj kaj postulus grandan kvanton da tempo. Esperanto supozeble ŝajnis facila. Mi trovis la Bostonan Esperanto-Klubon kaj je 1979 aŭ 1980 iris tien.

Dum pluraj semajnoj mi estis ano de grupo de kvar aŭ kvin studentoj, kiuj lernis de Florence Mack. Estis semajnaj kunsidoj ĉe la *Natick Mall* (vendej-reto) de 1980 ĝis 1991. Mi ĉeestis tiujn kunsidojn.

Esperanto, por mi, komenciĝis kiel hobbio, sed poste mi konsideris ĝin kiel ilo por plibonigi la mondon. Mi konvinkiĝis ke ordinara persono povas krei ŝanĝon per ĉi-tiu movado.

Baldaŭ mi reverkis broŝuron, "*Be Ahead of Your Generation: Learn Esperanto!*" (Estu antaŭ via generacio: Lernu Esperanton!). La broŝuro en la malnova formato havis kvar litertipojn sur la unua paĝo. Ĝi aspektis netaŭga. Mi organizis komitaton por revizii ĝin. Kun la helpo de la komitato la broŝuro pliboniĝis kaj ni sendis ĝin al Usonaj lokaj grupoj.

Parte pro tiu laboro, je 1983 mi elektiĝis al la Estraro de ELNA (Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko). La granda projekto, kiun mi akceptis estis aperigado de libro de David Richardson, "*Esperanto: Learning and Using the Internantional Language*" (Esperanto: Lernu kaj uzu la Internacian Lingvon).

Ĉe kunsido de la ELNA Estraro, ili demandis kiel ELNA povus akiri la monon por aperigi tiun libron. Mi respondis per tri-vorta respondo: "Petu! Ekspliku kial!" La venontan tagon, ĉe la kongreso, mi petis kaj eksplikis kial, kaj personoj donacis \$357. La Estraro petis min estri la projekton.

Mia unua paŝo estis dungi profesion redaktoron (fakte, mian edzinon, kiu eĉ verkis libron pri teknika redaktado). Tiam mi petis monon de la membroj de ELNA. Unue, de personoj kiuj antaŭe donacis al ELNA, mi trovis kvin mil dolarojn. Tiam mi sendis leteron al ĉiuj ELNA membroj kaj petis ilin antaŭmendi la libron. Ni gajnis entute \$20.000, sufiĉe por komposti la libron, kaj presi tri mil ekzemplerojn.

La Richardson-a libro pruviĝis utila ilo por interesi personojn kaj informi ilin pri Esperanto. Hodiaŭ ĝi estas en centoj da bibliotekoj tra la lando. Mi fieras, ke mia estrado de la projekto efikigis la aperon de la libro.

Mi kandidatiĝis por Prezidanto de ELNA en 1993, kaj malgajnis. Mi kandidatiĝis en 1996, ĉi-foje sen alia kandidato, kaj gajnis. La membraro re-elektis min en 2001. Tiu oficperiodo finiĝis en 2002, kaj mi ne rajtas elektiĝi denove, sed mi restos aktiva en nia Movado.

Al la legantoj de Komencanto mi esperas
feliĉan vojaĝon tra Esperantujo!
David Wolff

La dua periodo de esperanta literaturo

Latvaj
poetoj

Karaj legantoj, ĉi-numere en nia literatur-historia rubriko ni volonte prezentas du latvajn poetojn. Ilin kunigas tio, ke la poetoj estis reprezentantoj de la sama lando; en la sama temp-periodo estis eldonitaj iliaj unuaj poemoj, kiuj indikis aperon de neordinara lirika poezio. Unu el tiuj verkistoj estas

Nikolao Kurzens,

kiun oni nomas unu el la plej talentaj originalaj Esperanto-poetoj. Li naskiĝis la 25-an de junio 1910 en la urbo Aluksne en norda Latvio. Li studis ekonomikon en la universitato en Riga, (ĉefurbo de Latvio), kie li poste loĝis kaj laboris kiel ŝtatoficisto. Ankoraŭ estante junulo, N.Kurzens esperantistiĝis kaj de tiu tempo partoprenis la Esperanto-agadon. En 1932 li iĝis vicprezidanto de Latvia Esperanto-Societo. De 1932 ĝis aŭgusto 1934 N.Kurzens estis redaktoro de Esperanta revuo "Ondo de Daŭgava", ankaŭ estis kunlaboranto de la revuoj "Literatura mondo" kaj "Norda Literaturo".

En 1938 aperis lia sola poemaro "Mia Spektro". La titolo de la poemaro jam malkovras kiom vasta kaj varia estas spektro de liaj verkoj — de melankoliaj kaj malgajaj poemoj, kiuj priskribas krudan realon kaj ofte senesperon de la vivo sen ia poezia ornamo, ĝis poemoj, en kiuj ni trovas alvokon aktive kontraŭstari tiun ĉi senesperon kaj pesimismon.

Nikolao Kurzens estas vera majstro de etaj formoj, liaj poemoj estas mallongaj, sed en ĉiu el ili manifestiĝas granda, rekta kaj trafa esprimovo. Liaj tradukoj el la latva apartenas al la plej bonaj tradukitaj poemoj.

Dum sia nelongdaŭra vivo (N.Kurzens mortis en 1959), kiu estis plena de la viv-suferoj kaj malfacilaĵoj, poeto N.Kurzens sukcesis verki kaj eldoni tute ne multon, sed verkoj, kiujn li lasis post si, iĝis lia poezia testamento.

Karaj legantoj, vi havas eblon legi ĉi-tie kaj ĝui kelkajn poemojn de Nikolao Kurzens, kiuj bone prezentas lin kiel majstro de poetikaj miniaturoj kaj samtempe respegulas lian diversflankan percepton de vivo kaj de la ĉirkaŭa mondo.

Aŭtuna elegio

Hieraŭ pluvis, kaj hodiaŭ pluvas
kaj morgaŭ same, lace glitos gutoj;
kaj same, lace iros la minutoj
de mia viv', sencela kaj enua.

Ja ĉiu tag' forlavas rabe ion!
Ja ĉiu nokto portas ion for!
Ja de l' pasinto restas nur memor'!
Ja por l' estonto havas mi nenion!
Ne fendas plu ĉielon fulma glavo,
ne tremas tondre plu la firmamento.

Ĉe la anguloj ploras ftiza vento,
kaj pluvas, pluvas, pluvas — tag' post tago.
Kaj ĉiu tag' forlavas rabe ion,
kaj ĉiu nokto portas ion for,
kaj de l' pasinto restas nur memor'
kaj por l' estonto — havas mi nenion...

La nova tago


Ne spiru: "ho!", ne diru: "se",
ne serĉu savon el pere'
en nuboj de l' imago.
Vin levu kun decida vol':
ĉi hor' ne estas por parol' -
nur agon sekvas pago.

Ne la suspiroj de l' sopir'
nur rekta kaj decida ir'
nin savos de la plago.
Ne el miela amo-kver' -
el dura fer', el firma ter'
sin levos Nova Tago.

Tempo pasas

Dum juno ĉiu vojo nin invitas
kaj ĉiu floro ŝajnas sin proponi;
Sur pint' plej alta ni aspiras troni,
eĉ pens pri cedo morde nin incitas.
Sed tempo pasas. Jaroj preter-glitas,
La spitan "ni" flankŝovas graso "oni".
Ni lernas kompromisi kaj duoni,

pruntitajn pensojn servo-prete citas.
Kaj iam nur, sub sprono alkohola
sin ŝiras el la cerb' haose bola
kaj provas kapon levi pens' aŭdaca.
Sed vane ĝi alarmon gongi provas:
la korp' inerta sin jam plu ne movas -
ĝi estas laca, peze, morte laca...



Petrova Je. [Magnitogorsk, Rusio]

Nomo de la dua vaste konata latva poeto estas

Ludmila Jevsejeva.

Sia literatura agado komenciĝis en la sama dua literatur-historia periodo kaj poste fruktodone daŭriĝis en la tria.

Ludmila Jevsejeva naskiĝis en 1913 en Riga. Estante ankoraŭ 16-jara gimnazianino ŝi iĝis esperantistino. Pri sia esperantistiĝo kaj pri tio, kion signifis Esperanto por ŝi dum la tuta vivo, L. Jevsejeva mem bone priskribis en malgranda artikoleto, kiun vi povas sube legi.

Ludmila Jevsejeva

MI PRI MI

Unue mi ekaŭdis la vorton "Esperanto" en la jaro 1929, kiam mi estis gimnazianino en Riga. Mia klasestro, la konata esperantisto Gennadij Tupicin parolis pri ĝi. Jam la unua leciono en lia prezento kaptis mian atenton kaj naskis intereson pro facileco de la lingvo. Tio, kion mi aŭdis dum la kusro, mirigis min, kaj mi eklernis Esperanton, ne ĉar mi sentis la bezonon pri iu fremda lingvo, sed simple tial, ke ĝi estas facila, regula kaj genia, kaj ke la lingvolernado donis al mi veran plezuron. Ĝi estis por mi kvazaŭ spirita sporto, kvazaŭ pensludo: per malmultaj certaj reguloj, prefiksoj kaj sufiksoj mi ja povis formi diversajn frazojn. Per Esperanto la mondo malfermiĝis al mi, fremdaj landoj fariĝis atingeblaj. Internatante kun la malproksimaj, nekonataj landoj, mi kvazaŭ sentis la pulsadon kaj animon de la mondo. Korespondado, veninta el alia lando, kvazaŭ elspiris senton de malproksimo kaj libero, en ĝi kvazaŭ aŭdiĝis malforta eĥo de bruo kaj vivo de fremdaj landoj. Jam en la gimnazio mi fondis E-rondeton kaj redaktis Esperantan murgazeton. Al Latva E-societo en Riga mi aniĝis en 1931 kaj dum la tridekaj jaroj laboris kiel ĝia estraranino kaj redaktorino de latva E-revuo "Ondo de Daŭgava". En la jaro 1933 mi komencis verki en Esperanto. Mi kunlaboris en la revuoj: "Literatura mondo", "Norda Prismo", "La suda stelo", "La Praktiko", "Juna Amiko", "Heroldo de Esperanto" ktp.

Ekde tiu tempo Esperanto por mi estiĝis ĉio: mia lumo, mia amo, mia fiero, la kolorriĉa mondo, la filozofio de la plej altaj akordoj. Mi dankas la sorton. Mi estas feliĉa.

Verkoj de L. Jevsejeva estas ankoraŭ ne plene eldonitaj. Kelkaj ŝiaj poemoj eniris la poemkolekton "Naŭ poetoj" (1938), redaktita kaj antaŭparolita de K.Kalocsay.

L. Jevsejeva multe verkis ankoraŭ por infanoj kaj tiu direkto de ŝia literatura agado estis tre valora por Esperanto-literaturo, ĉar eĉ en la nuna periodo en la mondo ne multas literaturo por infanoj kaj nemultaj verkistoj sin okupas pri tiu problemo.

Neatendita morto subite rompis la vivon de L. Jevsejeva, kiam ŝi estis sesdek sep jara kaj ankoraŭ plena de multaj planoj kaj diversaj projektoj (ŝi mortis en 1980 subite sur strato, irante al la laboro). Sed ŝiaj ĉarmaj kaj sinceraj poemoj daŭras vivi kaj impresi legantojn. Ĉi tie ni prezentas kelkaj verkojn de Ludmila Jevsejeva.

El la infanaj versetoj

Festo en zooparko

Tra-ta-tam! Tra-ta-tam! —
Marŝas la hipopotam'.

Tru-ru! Tru-ru! — sonas kanto
De longnaza elefanto.

Du simioj — Pu kaj Ĉa —
Salte danças ĉa-ĉa-ĉa.

Kia bruo! Kia bruo! —
Suprenlevas bekon gruo.

Ĉu okazis incendio?
Brulas kio? Brulas kie?

Diras muso Miki-Maŭso:
— Ne nervozu vi sen kaŭzo!

Gajas ĉiu parka besto
Pro leona edziĝfesto.

Kie restis la kvara?

— En la ĉambro estis kvar
Seĝoj, — diris Mara,
— Sed mi vidas sole tri...
Kie restis kvara?

— Malperfekte vidas vi,
Fratineto kara!
Jen rigardu: vi ja mem
Sidus sur la kvara!



Kononova Snejana, [N.Omka, Rusio]

Ne demandu

Ne demandu, kial velkis rozoj.
Ĉu mi scias, eble kulpas frost'.
Kaj al kiu mi prezentus ilin
Kun aplombe bondezira tost'?
Ne demandu, kial palas vangoj.
Ĉu mi scias, kie restis jun'?
Super marĉoj, tra nebulvualoj,
Palpas vojon anemia lun'.
Ne demandu, kial pasis amo.
Ĉu mi scias, mi ne gardis ĝin.
Se jam lipoj ne plu serĉas lipojn —
Sciu, ke al ĉio venis fin'.

Letero sen adreso

Sen vi deprimas min angor',
Sed kiu tion kredas?
Al vi leteron skribis mi,
Sed kiu ĝin ekspedos?
Mi eble nubon petu... sed
Letero malsekiĝos.
Al vento komisii — ve!
Sensigne ĝi perdiĝos.
Al mara fiŝo doni... ne,
Ĉar dronos la letero,
Kaj ne ekscios la amik'
Pri mia korsufero.
Mi ĝin volonte portus mem
Al kara adresato,
Se mi nur scius, kie nun
Trovegas vi, amato!

Karaj amikoj!

Abonanto de KOMENCANTO el Germanio
Jürgen Kloker servas kiel Internacia Policisto de
 KFOR de UN en Kosovo, Jugoslavio. Jürgen
 sendis al la redakcio de "K" raportojn pri siaj im-
 presoj, kiujn li originale verkis en Esperanto.

Jürgen Kloker Internacia germana policisto por la servo de la Unuiĝintaj Nacioj

En Kosovo — parto 1



En mia hejmlando kutime mi estas patrol-policisto en mezgranda urbo en sud-Germanio. Antaŭe mi de-
 joris kelkajn jarojn en speciala taĉmento por policaj kontroloj de futballudoj, demon-
 stracioj, violentaj krimuloj ktp. Iam post kutima deĵorinterkonferenco mia
 ĉefo montris al mi kaj al la kolegoj adju-
 dikadon de la Unuiĝintaj Nacioj. La UN
 bezonas nepre policistojn por deĵori en
 Kosovo. La postulatajn kondiĉojn mi po-
 vis plenumi. Mi pripensis kaj sekvis pa-
 roladoj kaj diskutoj kun gepatroj kaj
 amikoj. Por mi tia tasko estus unika
 ebleco agi en politike maltrankvila re-
 giono, kiu ne havas stabilan demokration
 kaj krome ĝi estus profesia provokado.
 Finfine mi aplikigis por tiu servo. Post la
 medicina kontrolo, testo pri scio de la
 angla lingvo kaj psikologia testo mi
 sukcesis la unuan paŝon. Sekvis ankoraŭ
 plua intensiva angla kurso kaj diversaj
 kursoj por prepariĝi al Kosovo. Post
 kvarmonata preparaĵo ĉirkaŭ 70 policis-
 toj flugis al Kosovo.

Post la alteriĝo ni unue veturis per busoj
 al hotelo en Pristina. Atendis nin kvin-
 taga enkonduko en aplikebla leĝo, vetur-
 pafo- kaj angla lingvo testoj, ĝeneralaj
 informoj ktp. Estis strange, sed malgraŭ
 bona preparado en Germanio, dum la

unua vespero ni sentis ioman malaplombon.

Ni iris al restoracio en uniformo. Tiele ni sentis nin pli
 sekuraj. Nokte ni aŭdis kelkajn pafojn. Venonttage oni
 diris al ni dum instruoj la kaŭzon: policistoj arestis kel-
 kajn tagojn antaŭe eminentajn Kosovo-Albanojn kaj al
 malmultaj homoj tio ne plaĉis.

La *enkondukejo* estis nur dek minutoj for de la ho-
 telo. Kiam ni iris tra la stratoj ni apenaŭ povis imagi, kiaj
 teruraĵoj okazis tie en la jaroj 1998/99. En la enkon-
 dukejo ni havis instruistojn de diversaj naciecoj. Ĉiuj
 trapasis bone la enkondukon kaj dum la lasta tago ni es-
 tis distribuitaj al la diversaj policejoj en la tuta Kosovo.

Mi estis aspiranto por speciala taĉmento kaj post
 plua pafotesto kaj intervjuo mi estis membro de tiel no-
 mata „High Risk Escort Unit“. Tio estas taĉmento por
 eskorti minacatajn personojn, ekz. serbajn advokatojn,
 kiuj devis veturadi al juĝejo. Ankaŭ eskorti validajn
 transportojn de la banko estis nia tasko.

En tiu taĉmento ni estis 18 internaciaj policistoj. Ni
 havis germanojn, anglojn, francojn, usonanojn, bulgarojn
 kaj rumanojn. Paroli kun ne-gepatraj lingvuloj ne estis
 problemo. Sed kun la aliaj estas kelkfoje problemo, ĉar ili
 ne konscias la diferencon de gepatra kaj la dua lingvo.
 Tiam ni diris „sorry, say again“ (pardonu, diru denove).
 Miskompreniĝo estas antaŭprogramita. Sed tiu lingvo-
 problemo ekzistas tra la tuta Kosovo-misio.

Mia unua tasko gvidis min al la policejo de urbeto en
 la sud-orienta Kosovo. Ni devus veturi por eskorti serbajn
 atestantojn en murdo-kazo. La juĝistoj aranĝis viziton de
 la deliktloko. Tio estis sensiva tasko, ĉar la deliktloko
 troviĝis en albania parto. Ni preparis nin por tiu tasko.
 Sed bedaŭrinde, kiam ni alvenis al la policejo, la ates-
 tantoj jam forlasis la lokon kun aliaj policistoj. Sed ni ne
 scias la kialon. Eble la miskompreniĝo estas lingva. Ni ne
 sukcesis klarigi la aferon kaj reveturis. Kompreneble mi
 estis iom malgaja. Sed la tempo sufiĉis por vidi la urbon
 Pristina, kie estas mia oficejo. Kolego montris al mi kel-
 kajn gravajn objektojn, ekzemple la ĉefkomandejon de
 KFOR (Kosovo Force), kie soldatoj kaj internaciaj policis-
 toj povas aĉeti ĉiutagajn bezonaĵojn aŭ la komandejon de
 UN, kiu estis antaŭe hotelo por serbaj oficiroj.

Post la fino de la enkonduko mi ankaŭ devis serĉi lo-
 ĝejon por mi. Ĉar internaciaj policistoj ne loĝas kiel
 soldatoj en kazernoj. Mi sekvis la konsilon de amiko kaj
 enloĝiĝis en proksima serba vilaĝo. Tie mi havis tutan
 malgrandan domon por mi. Mi preferis loĝi en la kam-
 paro, ĉar ĝi estis pli pura ol la t. n. ĉefurbo Pristina. Be-
 daŭrinde post kelkaj tagoj mi konstatis, ke la luiganto
 traserĉis mian proprajn kaj ŝtelis unu valoran poŝlam-
 pon. Pro tio mi estis devigata translokiĝi. Mi trovis novan
 loĝejon en Pristina, kie mi ja komence ne volis loĝi. Sed
 estis granda domo rando de la urbo kun propra korto por
 kvar kolegoj. Mi estis gaja kaj kontena.

En Kosovo — parto 2



Post kelkaj tagoj mi estis tute enkondukita kaj sciis la taktikojn. Ne estis malfacila por mi, ĉar mi faris similan laboron en Germanio. Mia unua grava tasko estis eskorti kvin serbojn de „Gate 3“ al la ĉefkomandejo de la Unuiĝintaj Nacioj en Pristina. Por tio ni uzis la tiel nomitan „Monster Truck“. Ĝi estas vehiklo, sekura kontraŭ minoj kaj pafadoj.

Bedaŭrinde ni malofte ricevis informojn pri la homoj, kiujn ni eskortis kaj kiujn ni devis gardi. Sed tio estas tre gravaj informoj por policistoj. Ankaŭ la departemento, kiu ordonas al ni, ne havas tiujn informojn. Ni supozas, ke tiu manko estas problemo de la supraj etaĝoj de la administracioj de UNMIK (United Nations Interims Administrative of Kosovo). Kiam la serboj havis renkontiĝon en Pristina, ni iris al restoracio por trinki iom. Post 2 horoj la renkontiĝo inter la serboj kaj la reprezentantoj de la UN estis finita. Pri kio temas, ni ne sciigis. La serboj petis nin veturi al proksima serba vilaĝo por tagmanĝi tie. Ni ofte veturigis serbojn en tiun vilaĝon kaj la restoracio estis tre ŝatata. Finfine ni atingis „Gate 3“ sen iu incidento. Kiam ni veturis hejmen la tradukisto diris al ni, kiajn homojn ni eskortis: do, estis vere tre altrangaj politikistoj kaj policistoj.

Alian tagon ni havis alian taskon. Ni veturis al banko en Pristina por eskorti bankiston kaj gardi monon. Tie pagas la bankisto en la komunuma administrejo por malriĉaj homoj socialan monon. Jam multe da homoj atendis tie, kiam ni alvenis. Unue ni zorgis, ke la homoj staru en unu linio. Tio estis sufiĉe malfacila, ĉar ni ne parolis serban aŭ albanan lingvojn kaj la homoj ne komprenis la anglan. Ni sukcesis kun la helpo de la Kosovo-policistoj, ĉar la policejo estis apude. Unu familio kun 2 infanoj ricevas la valoron ĉirkaŭ cent eŭroj. Tio devas sufiĉi por

unu monato; ne estas multe. Kaj ĉiu scias: *kie mankas mono, venas krimoj.*

Kelkajn tagojn poste ni denove veturis al tiu banko. Ni veturis kun la bankisto al fora malgranda vilaĝo. La vilaĝo konsistis nur el kelkaj domoj. La bankisto iris al normale aspekta domo. Ni sekvis lin kaj miris pri tio, ĉar ni ja bezonis bankon. Sed kiam ni okazis en la domo, ni konsciis, ke la normala domo funkcias kiel banko. Ni pensis, ke tio eblas nur en Kosovo. La bankisto informis nin, ke li bezonas unu horon kaj ke li ne bezonas gardiston en la domon. Ni konsentis kaj trinkis kafon en kontraŭ situanta kafejo. Ĉar la vetero estis malgraŭ la februaro tute bela, ni sidiĝis sur la teraso. Post kelkaj minutoj ni vidis polvonubon kiu proksimiĝis. Iam ni ekkonis la objekton.

Estis tanko de la rusa KFOR. Ili haltis antaŭ ni kaj demandis pri la vojo. Sed ni ne sciis ĝin. Se vi devas veturi en Kosovo-n, vi nepre devus havi mapon aŭ scii la vojon; se vi ne volas esti perdita. Ankaŭ la afero kun la kelnero en la kafejo estis gaja. Ĉar ni ne povis komuniki en iu lingvo. Ni komunikis per gestoj kaj ankaŭ sukcesis pri la kafo.

Meze de februaro estis demonstracio. La kaŭzoj estis la aresto de eminentaj Kosovo-Albanoj (menciita en parto I). Multe da policistoj de diversaj departementoj deĵoris. Estis ankaŭ specialaj taĉmentoj de Pakistano kaj Hindio. Tio estis stranga, ĉar ambaŭ ŝtatoj estas etaj malamikoj. Sed tie en Kosovo ili kunlaboras. La demonstracio estis ĉefe paca. Nur unufoje estis ĝi iom ekscitita. Kelkaj manifestaciantoj jetis ŝtonojn kaj botelojn kaj du policistoj estis iom vunditaj.



Eksa serba policejo en Pristina, detruita de NATO per aviadila atako, staranta ankoraŭ tri jaroj poste. daŭrigota

Leksina Ludmila

[Sudja, Rusio]

Besta alfabeto*Datirigo. Komenco**(A,B,C) en la numero 8-2001**C, D, E, F en 1-2002; G, Ĝ, H, I en 2-2002**K, L, M, N en 3-2002***O**

Orangutango oratoras.
 "Oktopodo omarojn omaĝas.
 Orko ostron obtenas.
 Ogro-ojstro ovion ofendas"
 Oponas otario oscedante,
 Obstinan oposumon observante.

P

Papago pasia,
 Pasero pasiva,
 Pavino, pandino,
 Pantero, porkino,
 Popare promenas,
 Popare parolas...
 Promenas, parolas,
 Parolas, promenas...

Bona fabeleto pri esenco de la vorto
 "mal"

*rerakonto de la fabelo de A. E. Izmajlov
 (19-a jarcento). Trovis kaj esperantigis:
 Zujeva Margarita [Moskvo, Rusio]*

Ŝtupetaro

La ŝtupetaro staris ĉe la muro. Estis ĉiuj ŝtupetoj egalaj. Nur la supra ŝtupeto ege fieris. "Mi estas la plej supra!"

La preterpasanto ekvidis tion, prenis la ŝtupetaron kaj facile renversis ĝin. La supra ŝtupo okazis la malsupra. La plej malsupra.





Jen homo sur la pinto de potenco fieras kaj ne sentas li danĝeron, sed vento ŝanĝiĝas. Potenco ruiniĝas.

Por gajaj instruantoj

Klare kaj facile ilustru la uzadon de la "iu"- derivaĵoj
 en Esperanto

rekomendas **Martin Ginette** [Saulxures/Moselotte, Francio]

U = homo, individuo

iu**ĉiu****tiu****neniu****Kiu****Pri lernantoj, instruistoj kaj fremdaj lingvoj**

- * Nenion alian tiom bone memoras lernantoj, kiel erarojn de siaj instruistoj.
- * Universitato evoluigas ĉiujn kapablojn de homo, inkluzive ankaŭ la stultecon.
- * Nur la mortintaj lingvoj iĝas senmortaj.
- * Ju pli malbone vi scias fremdan lingvon, des pli malmulte vi povos en ĝi mensogi.
- * La lingvon oni uzas aŭ por esprimi la pensojn, aŭ por kaŝi la pensojn, aŭ anstataŭ pensoj.
- * Li sciis silenti en sep lingvoj.
- * Mi parolas en Esperanto tre flue, kvazaŭ mi tie naskiĝis.

*El la libro de Konstantin Duŝenko esperantigis
 Jafasova Raja, [Ekaterinburg, Rusio]*

kaj scivolemaj lernantoj

Vŝivceva Tatjana [Miass, Rusio]

Daŭrigo. Komenco en "K"-2-02

Tatjana Vŝivceva prezentas por via atento "Gajan Gramatikon" - la famajn "16 regulojn" en humura aspekto. Ni rekomendas tiujn versetojn por kursgvidantoj kaj komentantoj.

Gaja Gramatiko

8. Por l'ordono objektiva
taŭgas "-u" — imperativo.

-u-

Nepre sciu, ne petolu,
Trankviliĝu, ne plu bolu,
Donu manon, sed ne livan,
Uzu la imperativon

9. "-Us" — finaj' estas signalo
de la kondicionalo.

-us-

Se ni gajus — ŝercon dirus,
Volus manĝi — tuj kuirus,
Por kuir' aĉetus salon —
Uzus kondicionalon.

10. Por l' aktivaj participoj,
uzu ni sufiksojn tipajn.

-int-

Vi, veninta, venis frue,
Vi, venonta, venos tuje,
Kaj venanta se vi estas
Venas ĝuste por la festo


-ant-

Kaj l' aktivaj gerundioj
havas la sufiksojn tiajn.

-ont-

Staras vi, veninte frue,
Vidos min, venonte tuje,
Kaj venante — mi admiras —
Vi sufiĉe gaje iras

daŭrigota



Bill Thorne, [Londono, Britio]

Prelegu

Konsiloj por la prelegantoj de Esperanto-
lecionoj, kiujn kolektis Bill Thorne,
ŝajnas el la propra sperto?

— Parolu al pli foraj aŭskultantoj
en la halo, alie neniu povos aŭdi
vin.

*

— Estu natura. Ne metu viajn ma-
nojn antaŭ via buŝo.

*

— Sendube vi estas bela, sed via vi-
zaĝo ne sufiĉas por interesigi ho-
mojn.

*

— Vi devas amuzi samtempe dum
vi instruas, do, ne estu tro serioza.

*

— Provizu ion por rigardi aŭ teni:
desegnojn, modelojn, diapozitivojn,
fotojn. Aŭ disdonu notojn pri via
parolado.

*

— Ne emfazu erojn de via prelego
per flustrado. Tiel gravaj ĵpunktoj de
via mesaĝo estos perditaj. Oni tute
ne povos aŭdi pri ili. Memoru, ke
leciono ne estas ordinara konver-
sacio.

daŭrigota

Neelpensitaj historioj

Okazintaj *al* aŭ tradukitaj *de* niaj legantoj

Teksto de **Abel Sidney de Souza** [Porto Velho – Rondonio – Brazilo].
Esperantigis **Jader Rodrigues da Silva** [Belo Horizonte - MG - Brazilo]

Kaleŝo

El la pluraj zorgoj de nia patro, kiam ni estis infanoj, evidentiĝis tiu, kiu igis nin kompreni la valoron de la ĝentileco por la vivo.

Plurfoje mi rimarkis lian ĝeniĝon rilate al la kutimo, kiun havas kelkaj personoj, nome — interrompi la parolon de la aliaj. Mi mem tiel agadis, sed tamen li neniam riproĉis min, malgraŭ lia perceptebla malĝojo.

Iam, frumatene, li proponis al mi promenadon tra bosko por aŭdi la kantadon de la birdoj. Kun granda ĝojo mi akceptis lian inviton, kaj tien ni piediris, dum la roso de la herbo malsekigis niajn ŝuojn, paŝojn post paŝoj.

Li haltis ĉe arbora maldensejo kaj post eta silento demandis min:

— Ĉu vi aŭdas ion krom la kantoj de la birdoj?

Mi eksilentis por kelkaj sekundoj kaj tuj poste respondis:

— Bruon de kaleŝo mi aŭdas. Eble ĝi malsupreniras laŭ la vojo.

— Vi pravas - diris li. — Temas pri malplena kaleŝo.

De tie, kie ni estis, ne eblis vidi la vojon kaj iom mirigite mi demandis lin:

— Kiel vi povas aserti, ke ĝi estas malplena?

— Nu, estas tre facile scii, ke temas ĝuste pri la kaleŝo malplena. Komprenoble vi scivolos kial mi scias tion?

— Jes - mi respondis iom impresita.



Mia patro surmetis sian dekstran manon sur mian ŝultron kaj rigardis al mi en la okulojn, klarigante:

— Pro la bruo, kiun ĝi faras. Ju pli malplena estas la kaleŝo, des pli laŭta estas ĝia bruo.

Li diris nenion pli, sed miaflanke, lia respondo igis min cerbumi longan tempon.

Jaroj pasis... Mi maturiĝis kaj ĝis nun, kiam mi vidas babileman aŭ altrudiĝeman homon, kiu abrupte interrompas ies ajn interparolon aŭ eĉ kiam mi mem senatente sentas, ke mi agos same, subite mi havas impreson, ke mi aŭdas la instruajn vortojn de mia patro en la bosko:

— Ju pli malplena estas la kaleŝo, des pli laŭta estas ĝia bruo!



Jabina Olga [Kamiŝnoje, Rusio]

Koko ofendiĝis

Foje en nia bieneto okazis incendio. Brulis nia remizo. Ni kiel ni povis estingis la fajron cele atingi la pordon de la remizo kaj liberigi niajn hejmbestojn.

Ni sukcesis forpreni de la danĝero ĉiujn kokinojn. Poste venis la fajrobrigadistoj, estingis la fajron plene. La afero estis nokte, tial ni iris dormi. Matene ni eniris en la duonforbrulitan remizon kaj ekvidis: en la plej fora angulo sidis nia sola koko (en la mallumo ni ĝin ne rimarkis) kun malseka hirtigita plumaro, malica al la tuta mondo, ofendita, ke ni ĝin ne savis. Ni tre gaje ridis, por spekti tion venis duono de la vilaĝanoj.

Kaptis en la reto kaj esperantigis
Kolotov Nikolao [Kaĉug, Rusio]

La saĝa kato

Rakontis amiko, kiu laboris kiel kuracisto en prizono.

Malliberuloj en siaj kameroj ofte havas la katojn, tion la prizona administracio kvazaŭ ne rimarkas. Unue, estas almenaŭ ia defendo kontraŭ ratoj, due: agrabla kaj karesa hejma besto bone influas la animojn de la krimuloj.

La ĝeneralan estimon kaj adoron de ambaŭ flankoj (de krimuloj kaj de administracio) ĝuis la kato Valet.

Tiu ĉi besto famis pro tio, ke dum tiel nomataj "kontrolaj traserĉadoj" de la kamero, kiam la prizonaj gardistoj ordone vicigas ĉiujn prizonulojn vizaĝe kaj *manoj-supren* al la muro, Valet starigis en la finon de ties vico sur siaj malantaŭaj piedoj, la antaŭajn piedojn ĝi metis sur la muron, samkiel la ceteraj prizonuloj kaj pacience atendis finon de la proceduro.

Tempo kaj homoj

Esperantigis el la portugallingva revuo "Bola Preta"
Jose Roberto Tenorjo [San-Paulo, Brazilo]

En la vivo necesas trovi tempon por gravaj aferoj

Iam instruisto pri scienco prenis vazon kun granda aperturo kaj metis kelkajn ŝtonojn en ĝin. Tiam li demandis la klason:

— Ĉu la vazo estas plena?

Ĉiuj respondis:

— Jes!

La instruisto, do, prenis sitelon da ŝtonetoj kaj elŝutis la tuton en la vazon. La ŝtonetoj eniĝis en la neokupitan spacon inter la ŝtonoj pli grandaj. Li demandis la lernantojn:

— Kaj nun, ĉu ĝi estas plena?

Ĉi-foje kelkaj hezitis, sed la plimulto respondis:

— Jes!

Tiam la instruisto levis ujon plenan de sablo kaj komencis elverŝi ĝin en la vazon. La sablo plenigis la mankantajn spacojn inter la ŝtonetoj. Je la tria fojo li demandis:

— Do, ĉu la vazo estas plena?

Nun la plimulto el la lernantoj jam hezitis, sed multaj ankoraŭ respondis:

— Jes!

La instruisto fine prenis kruĉon da akvo kaj verŝis ĝin en la vazon. La akvo penetris en la sablon. Ĉe tiu punkto li demandis la klason:

— Kion celas ĉi tiu demonstrado?

Juna kaj klera lernanto levis la manon kaj diris:


— Ne gravas kiom da aferoj oni devas fari dum la vivo, ĉiam troviĝos spaco por pli da...

— Ne temas pri tio, diris la instruisto. Kion vi devas observi estas la jeno: se vi ne metos unue la grandajn ŝtonojn en la vazon, neniam vi sukcesos fari tion poste. La grandaj ŝtonoj ĝuste estas tiuj gravaj aferoj en via vivo:

via familio, viaj amikoj, via disvolviĝo persona kaj profesia.

Se vi plenigos vian vivon nur per aferetoj, kiel mi elmontris per la ŝtonetoj, sablo kaj akvo, neniam tiuj vere gravaj aferoj trovos tempon aŭ spacon en via vivo.

Per data tempo...



Prokopjev Dmitrij, [Ĉaŝi, Rusio]



El "Proverbaro" de L.L. Zamenhof

Venas prudento post la ĝusta momento.

Tro rapida akcelo ne kondukas al celo.

Tro longa atendo ĝis la fino de l' vendo.

Unua venis, unua prenis.

Tro longaj kalkuloj kondukas al nuloj.

Tempo venos, zorgon prenos.

Ŝuldon tempo ne kuracas.

Ŝajnon ne fidu, juĝi ne rapidu.

Sprit' en tempo neĝusta estas tre malbonĝusta.

Se vi pri ĉio informiĝos, vi baldaŭ maljuniĝos.

Se la tempo forblovis, ni jam helpi ne povas; kio post ni aperos, ni de tio ne suferos.

Ŝparu tempon — legu aforismojn.

AFORISMOJ

Ginette Martin

[Saulxures/Moselotte,
Francio]

Posedo estas kaptilo: kion ni
kredas posedi, posedas nin
Alphonse Karr

*

Neniu homo havas sufiĉe da
memorkapablo, por daŭre
sukcese mensogi.
Abraham Lincoln

*

Prospero montras la
feliĉulojn, malprospero
elmontras grandanimajn
homojn.
Plino la juna

Belousov Igorj

[Marks, Rusio]

Monujo estas plej sentema
organo de la homa korpo.

*

Plej maldankema laboro estas
tiu, pro kiu oni ricevas nur
dankojn

Yves Bruso

[Douarnenez, Francio]

*Profundaj pensadoj de
Doktoro Kaprusta, profesoro ĉe la
Universitato de Frenezurbo*

Ĉio estas en ĉio, kaj inverse.

*

Mi insistas: la plej mallonga
vojo de unu punkto ĝis la alia
estas ekzakte la sama en la
inversa direkto.

*

La plej mallonga vojo de unu
punkto ĝis la alia estas la
rekta linio, kondiĉe, ke la du
punktoj estu vidalvide unu al
la alia.

Zujeva Margarita

[Moskvo, Rusio]

Malhelaj okulvitroj
konservas vidkapablon,
roz koloraj — sanon.
popola saĝo

*

Vera prudento konsistas
en jeno: komencinte iun
faron oni devas antaŭvidi
ĝian finon.
orienta popola saĝo

*

Ne necesas bedaŭri pri
tio, kion oni ne povas
korekti
Samuel Ĝonson

el kolekto de
Všivceva Tatjana
[Miass, Rusio]

Klarigoj

Amiko — homo, kiu
bonege konas vin, sed
malgraŭ tio ŝatas vin.

*

Edukado estas procezo,
dum kiu komence oni
instruas la infanon paroli
kaj poste — silenti.

*

Ideala viro — tiu, kiun
via edzino konis antaŭ, ol
edziniĝi al vi.

*

Konfeso — rakonto pri
tio, kion oni ne devas fari
post kiam oni faris tion,
pri kio oni ne devas
paroli.

Marĉeva Nastja, [Oblucje, Rusio]



Ripozo, ferioj

Ripozo — tio, kion vi faras, kiam
neniu diras al vi, kion necesas fari
Djosef Prendergast

*

La ripozo estas bezonata — mi povas
fari la jaran amplekson de la laboro
dum 9 monatoj sed ne dum 12.
Djon Pirpont Morgan

*

Eterna neniofarado — estas vera
infero.
Bernard Show

*

Mi neniam estas tiel okupata, kiel
dum horoj de mia ripozo.
Ciceron

*

Estas bone fari nenion kaj poste
bone ripozi!
Hispana proverbo

*

Turismo estas la plej bona ripozo,
sed ripozo estas pli bona, ol turismo.
NN

*

Plani feriojn estas facile. La ĉefo diras
al vi kiam; kaj la edzino kie.
NN

*

La plej bona parto de dimanĉo estas
vespero de sabato
Jilber Sesborn

*

Nenion fari estas bonega okupo. Sed
kiom grandas la konkurenco!
NN



Zujeva Margarita
[Moskvo, Rusio]

— Kial vi anstataŭ la svisa
fromaĝo vendas al mi
nederlandan?
— Ĉu vi kun ĝi intencas
interparoli? *

— Kial via fratino ekdeziris
studi je dentisto?
— Al ŝi plaĉas, kiam la viroj
rigardas ŝin malferminte la
buŝon kun larĝe apertaj okuloj.

Kuznecova Elena
[Sretensk, Rusio]

La plej bonaj kiuristoj estas viroj,
sed la plej bonaj kuiristinoj estas
virinoj.

Mariĉeva Nastja
[Obluĉje, Rusio]

Telefonmendo al restoracio.
— Ĉu mi povas mendi unu
tablon?
— Kiom eblas ripeti — ni ne
vendas meblojn!

Yves Bruso
[Douarnenez, France]

Malbona memoro.
— S-ro doktoro, mi
komencas perdi mian
memoron.
— Ha! Ĉu de longe?
— ?! De longe kio?

Hieraŭ, dum kunveno mia
amiko demandis:
— Ĉu vi havas nenion por
sidigi vin?
— Hol! Jes, ja, mi havas. Sed
kien meti ĝin, mi ne scias.

Tre eminenta sinjoro eniras
en la vendejon de subvestoj.
La vendistino proksimiĝas.
— Kion vi deziras, sinjoro?
— Kion mi deziras? Mi
deziras preni vin en miajn
brakojn kaj forveturi kun
vi... Sed tio, kion mi bezonas
estas paro da ŝtrumpetoj.

Jabina Olga
[Kamiŝnoje, Rusio]

— Sinjoro, singarde!
La ŝtup-aro estas
kovrita per oleo...
— Silentu, aĉulo -ulo-
ulo-ulo-ulo!!! *

Novikov Viktor
[Kuzino, Rusio]

Direktoro adiaŭas dum maldungo
kun sia eks-kunlaboranto:
— Estas tre bedaŭrinde. Mi
kutimiĝis al vi. Vi estis por mi
kvazaŭ mia filo: same
senrespondeca, pigra,
neorganizita. *

La ĉefo vokas sekretariinon:
— Angelino, karulino, tiun ĉi
leteron necesas korekti kaj sendi
per telefakso. Vidu, kion vi tajpisl
"Kara amiko". Al tiu fripono, kaj
fiaĉulo?!
— Bone, mi tuj ĉion korektos. Kiel
do necesas skribi?
— "Estimata kolego!" *

— Sinjoro kuracisto, respondu al
mi. *Idioto* - tio estas malsano?
— Por vi, karulo, resaniĝo.


— Ĉu vi scias, mi inventis
manieron kiel iĝi riĉa.
— Mi scias, sed ĉe mi vi jam
prunteprenis.

Dogadin Dmitrij
[Volgogrado, Rusio]


— S-ro kuracisto, hodiaŭ, kiam mi
rigardis spegulon, mi rimarkis, ke
unu mia okulo diferencas de la
alia
— Ĉu vere? Kaj kiu konkrete?

Anonco en la sporta vendejo:

"Ĉiu, kiu aĉetos en nia vendejo la
montajn skiojn senpage ricevos
lambastonojn!"



Krucvortenigmo de Bill Thorne (fragmento)



Horizontale

1. Duono de vojo. 5. Interterpe. 6. Alta leda piedvesto. 7. Estos finfarota. 9. Perpendikulara. 10. Kuŝas en monuj'. 12. Larĝa piedbazo de diversaj mamuloj. 13. Instrumento. 14. Manĝaĵo el kuiritaj ovoj. 15. Post bano mi estas ... 16. Senobstakla. 17. Unua, dua, ...

Vertikale

1. Ŝanĝi, plibonigi. 2. Nia Majstro. 3. Formo de vojo de planedo aŭ kometo. 4. Multe da fojoj unu post la alia... 8. Kiu profesie planas kaj konstruas donojn, palacojn ktp. 10. Ĉina ...' 11. Ordinara, kutima. 14. Manĝa, drinka kaj seksa diboĉo. 15. Vazo por kuiri. 18. Delikata, agrablaodoro.

Responde al la RIMARO
de Bill Thorne

...

Zavjalova Tatjana
[Arhangelsk, Rusio]

**Mankas feliĉo
en la vivo**

Nigran kafon
trinkis grafo
el karafo.
Jen la la pafo -
rekta trafo
en karafon.
Tuta kafo
el karafo
kvazaŭ lafo
al la grafo.
Epitafo
kun parafo -
mortis grafo.

*

Zujeva Margarita
[Moskvo, Rusio]

**Ne belas vivo
sen akuzativo!**

Ĉe l' advokato
malbonas fato:
griza rato
formanĝis kato,
aŭ kato
formanĝis rato..?

...

**Ne, ne belas vivo
sen akuzativo!**

RIMARO



Bill Thorne

EGO

grego
pego
prelego

EĜO

leĝo
neĝo
preĝo
reĝo
seĝo

EKO

apoteko
beko
biblioteko
bifsteko
bleko
ĉeko
kopeko
peko
steko
teko

EKTO

afekto
aspekto
dialekto
difekto
direkto
efekto
elekto
infekto
insekto
intelekto
introspekto
kolekto
konjekto
objekto
projekto

Respondoj al la enigmoj el al "K"— 1:

Por ĉiu ĝentlemano — sia slogano!: 1-ĉeko; 2-infero; 3-Afriko; 4-majo; 5-eho; 6-seĝo; 7-pino; 8-enuo; 9-rozo; 10-unu. La ĉifrita frazo — "Ĉiam esperu!"

"Ĉevala" krucenigmo: *Horizontale*: 1-kaleŝo; 2-ĉevalo; 3-kavalkado; 4-rajdi; 5-brido; *Vertikale*: 1-kavalerio; 2-galopo; 3-selo; 4-oveno; jungi.

Respondoj al la enigmoj en "K"— 2

Demandoj ŝercaj — respondoj inversaj: 1-per kulereto; 2-via nomo; 3-muŝoj vintre ne aperas; 4-ĉar ili ne povas paŝi; 5-viaj ŝuoj; 6-spiras; 7-ebłas forsalti de la plej malsupra ŝtupeto; 8-cifero 6(9); 9-tri viroj estas avo, patro kaj filo; 10-homaro.

Invitoj kaj informoj

Universala Esperanto-Asocio

Al lingva demokratio!

Alvoko al la esperantistaro (kaj aparte al la membroj de UEA- TEJO- ILEI).

Karaj membroj (kaj ne-membroj), ni dankas ĉiujn tiujn el vi, kiuj dum la pasinta jaro kunlaboris kun siaj asocioj por la plenumo de la taskoj de la labor-plano. Laŭ via memoro ni estas speco de "garantia komisiono", kiu certigas, ke la labor-plano estos kunlabore plenumata de la membroj de niaj tri organizaĵoj.

La labor-plano emfazas la jenajn prioritatojn:

informado * instruado * utiligado
plijuniĝo * tutmondiĝo * profesiigi

Ili estas en si mem klaraj, kaj vi povas detale legi en la labor-plano mem, kiel ili estas komprenataj. Cetere la teksto de la laborplano estas ricevebla per mesaĝo al <uea@co.uea.org> aŭ per aliĝo al la listo:

<al-lingva-demokratio@yahoogroups.com>.

Dum la pasinta jaro multo estis realigata en la kampo "informado" kaj papera kaj reta, kaj kelkaj progresoj estis realigataj en ĉiuj aliaj labor-kampoj. En la nova jaro ni bezonas doni apartan atenton al "instruado", "utiligado" kaj "plijuniĝo".

Ni varme konsilas, ke en ĉiu lando kaj en ĉiu organizaĵo estu almenaŭ unu homo, kiu respondecas pri la realigo de la labor-plano kaj aliĝas al la listo, kie ĝuste oni diskutas pri tio, per malplena mesaĝo al la adreso

<al-lingva-demokratio-subscribe@yahoogroups.com>.

Ni kopias frazon de la pasintjara mesaĝo, kiu restas daŭre aktuala:

"Unu lasta afero devas esti klara al ĉiuj: ni ne bezonas konkurenci kaj batali inter ni. Ni estas ĉiuj laborantoj por la sama idealo preter kelkfoje tro rigidaj asociaj limoj. La labor-plano, kiun vi legos, emfazas la rolon kaj de UEA kaj de TEJO kaj de ILEI, kaj de ĉiuj aliaj esperantistaj asocioj, kaj ni ŝatus en ĉiuj landoj vidi kunlaboron, eĉ se kun la bezonata memstareco de ĉiu organizaĵo."

Ni faros nian komunan eblon por helpi vin kaj ni dankas vin pro viaj estontaj klopodoj.

Renato Corsetti, prezidanto de UEA

Holger Boos, prezidanto de TEJO

Mauro La Torre, prezidanto de ILEI

Trevor Steele, ĝenerala direktoro de UEA

87-a Universala Kongreso

La 87-a Universala Kongreso de Esperanto sukcese pasis en Fortalezo (Brazilo) de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 2002. Ĉeestis 1484 partoprenantoj el 58 landoj.

Internacia Junulara Kongreso

Internacia Junulara Kongreso pasis en Pato-Branko, Brazilo, de la 21a ĝis la 28a de julio.

Detaloj pri la kongresoj ĉe www.uea.org

IvERO — 3

Ivanova E - Renkontiĝo
(06-14.07.2002) Ivanovo estas
granda provinca urbo en Rusio

La renkontiĝon partoprenis 45 personoj, pli ol duono el ili havas Esperanto-movadan sperton de 10 ĝis pli ol 40 jaroj. Inter veraj veteranoj menciendas Jefim Zajdman, Mikaelo Bronŝtejn, Valerija Cvetkova, Leonid Borisov, Dmitrij Cibulevskij, kiuj ĉeestis la revivigon de Sovetia E-movado en 50-60-j jaroj kaj kreon de tiama SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado).

La programo ne estis streĉa, sufiĉis tempo kaj por seriozaj aranĝoj: kursoj, prelegoj kaj por amuzaj: konkursoj, koncertoj, ludoj kaj por la ripozo ĉe loka rivero.

Tradicie abunda estis la infana programo. La renkontiĝon partoprenis 12 familioj — la plej grandaj estis tiuj de Obrezkov el 5 personoj.

Vespere oni povis ĝui koncertojn de Esperanto-bardoj M. Bronŝtejn, L. Borisov, J. Zajdman, A. Obrezkov. Sed la plej valora estis la komunikado, precipe kun tiuj, kiuj havas riĉegan sperton de Esperanto-agado.

La organizantoj (A. Obrezkov, T. Loskutova, S. Brovceva, I. Galicina, L. Malej) kontentas pri la rezultoj kaj esperas, ke la kvanto de la partoprenantoj plu kaj plu kreskos. Vidu www.ivanovo.ac.ru/alumni/obran

Andrej Obrezkov
(obran@esperanto.msx.ru)

AFORE

Asocio de For-orientaj
Rusiaj Esperantistoj

Karaj esperantistoj de For-Oriento kaj Apud-Bajkala Regiono!

La fondita "Asocio de For-orientaj Rusiaj Esperantistoj" surbaze de Vladivostoka Esperanto-klubo "Pacifiko" ege bezonas siajn novajn aktivajn membrojn por eldoni la informilon "La Pacifika Kuriero", aranĝi diversajn kunvenojn kaj tendarojn k.t.p.

La adreso:

Titaev Aleksandr Borisoviĉ
do vostrebovanija, 690090,
Vladivostok-90, Rusio
rete: <oriento@mail.ru>

Katajeva Jelena
[Moskvo, Rusio]



RET — 02 Rusiaj Esperanto-Tagoj

15-25 de aŭgusto 2002 sukcese pasis Rusiaj Esperanto-Tagoj, pri kiuj KOMENCANTO informis en la 2-a kajero.

Pli ol cent partoprenintoj bone ripozis kaj esperantumis ĉe la rivero Kljazjma en belega naturo de Meza Rusio. Venis amaso da esperantistoj, kiuj ne partoprenis tutlandajn E-renkontiĝojn dum 10 aŭ eĉ 20 jaroj! Ni kvazaŭ dronis en agrablaj rememoroj de nia juneco.

Riĉega programo, tagoj, plenŝtopitaj de interesaj, atentokaptaj aranĝoj: Supera Kurso, aliaj kursoj, Somera Universitato, Intelektaj ludoj, Intrepretista kaj Retorika konkursoj, Internacia vespero — ĉeestis homoj el 6 landoj!

Okazis prelegoj de M. Bronŝtejn kaj G. Arosjev pri literaturaj temoj. Dezirantoj partoprenis ekskursojn al antikvaj rusiaj urboj Vladimir kaj Suzdal.

Kantoj, kantoj sonis tra la tuta periodo. Koncertoj sekvis unu post la alia foje eĉ po 3 sinsekve! Venis ĉiuj kantistoj kaj komponistoj, kiuj promesis — Ĵomart Amzjeev kaj Nataŝa Gerlaĥ el Svedio, Pavel Korotenko kaj Vladimir Soroka & kompanio el Ukrainio, Andreo Obrezkov, Mikaelo Bronŝtejn, Grigorij Arosjev, Sergeo Bozin, Maŝa Koĉetkova, Mikaelo Povorin — el diversaj rusiaj urboj. Brile aktoris pantomime Konstantin Malasajev.

Junuloj kaj eks-junuloj estis en proksimume egala kvanto, sed neniu rimarkis la aĝojn. Preskaŭ neniu kontaktoj estis kun la ekstera mondo, senzorga ripozo en la Verda Respubliko.

Viktor Kudrjavcev

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ciu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi deziras interkorespondi per paper-poŝto.

Mia adreso estas:

Paulo de Souza
Rua Dom Nery, 324 -
Centro Pouso Alegre,
M.G. 37.550-000

Brasilo

Ret-adresoj de
Kataluna E-Asocio:

<http://www.esperanto-ct.org>
kea@esperanto-ct.org

Llibert Puig,
la kasisito
kea-kasisto@Esperanto-ct.org

22-jara komencanto dezi-
ras korespondi tutmonde
por plibonigi sian E-ton.

Dogadin Dmitrij
bv. Engelsa, 29—154
Volgograd
RU-400026

Rusio

35-jara edzo, komencanto, pri
lingvoj, komputiloj, scienco,
biciklado, azia kuirarto.

Bert Klijn
Klipper 119,
1721 GW Langedijk,

Nederlando

<bertmariam@hetnet.nl>

Internacia koresponda
Adresaro

Vi povas korespondi kun
amikoj de la tuta mondo. La
adreslisto enhavas pli ol 200
adresojn el pli ol 40 landoj.
Sendu vian adreson kun viaj
temoj por korespondado —
ĝi aldoniĝos al la listo tute
senpage.

Por ricevi la liston aldonu 2
IRK aŭ 1 eŭron

Lazaro Azcuy
Apartado Postal 3026
Habana 13, CP-11300
La Habana,

Kubo

Rodina Marina, [Jurgamiŝ, Rusio]



32-jara francano
korespondus kun
Islandan-Finlandan-
Kebekan-Kolombian-
Baltan-Usonan(in)oj.
Interesoj: poemi , pentri,
legi literaturon, aŭskulti
muzikon, mediti en la
naturo, legi runojn...

Frederic Meconte

<itrikanen-milid-a-
milendal@ifrance.com>

Kolektas filatelaĵojn es-
perantajn kiel ekzemple:
uzitajn kaj neuzitajn
poŝtmarkojn pri temo Es-
peranto, E-bildkartojn,
aliajn E-eldonaĵojn okaze
de Universalaj Kongresoj,
ktp ks.

Piotr Smigiel
ul. Bronikowskiego 3 m.2,
PL-85426

Bydgoszcz
Pollando

36-jara filozofistudentino,
komencanto. Min interesas
Martinus-kosmologio, vo-
jaĝoj, kulturoj, montprome-
noj.

Renee Aagesen
Myrvejen 17,
9020 Tromstaden

Norvegio

Kontaktoj kun esperantistoj
el la tuta mondo serĉas 56
jara kolektanto de telefonaj
kartoj

Vladimir Pys
Trachovec 3013
OSTRAVA-Martinov
CR — 723 00

**Ĉeska
Republika**

21-jara viro, studas filozo-
fion, interesiĝas pri litera-
turo, kinejo, muziko, ŝako.

Jean-Baptiste Monneuse
av. du Mal Juin,
FR-92100
Boulogne-Billancourt
Paris

Francio

KOMENCANTO 2003

16 paĝoj
kolora kovrilo
famaj esperantistoj
historio de E-literaturo
gramatiko serioze kaj ŝerce
neelpensitaj historioj,
amuzaj rakontoj
proverboj, enigmoj
aforismoj, anekdotoj
anoncetoj, adresoj
multaj multaj bildoj

Bonvolu noti novan retpoŝtan adreson de **KOMENCANTO**

komencanto@r66.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

